

Eŭropa Bulteno

Junio/julio 2014, Numero 139

ESPERANTISTOJ AKCEPTITAJ ĈE LA KROATIA ŜTATPREZIDANTO IVO JOSIPOVIĆ



Seppersona esperantista delegacio estis akceptita de la ŝtatprezidanto de Kroatio Ivo Josipović la 11-an de junio 2014 en la prezidantejo Pantovčak en Zagrebo. La delagacion gvidis la prezidanto de EEU d-ro Seán Ó Riain kaj aliaj membroj estis: Zlatko Tišljár (sekretario de EEU), Boris Di Costanzo (prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, Anto Mlinar (prezidanto de Kroatia E-Ligo), Spomenka Štimec (sekretariino de KEL), Nikola Rašić, (membro de la estraro de EEU) kaj Đivo Pulitika (prezidanto de Kroatia E-Junularo). La renkontiĝo daŭris pli ol duonhoron en la frua posttagmezo. Ni proponis al li du aferojn: pristudi la slovakon Nacian Konvencion pri EU por eventuale proponi fondon de simila institucio en Kroatio kaj ke li subtenu nian proponon al Buroo de EP en Strasbourgo okazigi unu Eŭroskola en Esperanto. Li diris ke li helpos. Li aparte interesiĝis pri E-muziko kaj li petis ke ni sendu al li E-tradukon de kroatia nacia himno. Li estas profesie komponisto. La traduko de nacia himno ekzistas ankoraŭ el la jaro 1911 kaj mi tuj la postan tagon sendis al li la petitan himnon kaj informojn.

Zlatko Tišljár

LA DEKA KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO

De la 6-a ĝis la 12-a de julio okazis en kroata urbo Rijeka la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. Kun 146 partoprenantoj el 21 landoj ĝi estis la plej malgranda ĝisnuna EEU-kongreso. Kaŭzoj por tio ne estas klaraj. Ŝajne influis kaj la ĝenerala ekonomia krizo kaj la fakto ke Rijeka kiel turisma urbo estis iom tro kosta por la najbarlandaj esperantistoj. Eble ankaŭ tro fruaj datoj aŭ simple la fakto ke ĝenerale la esperantistoj ĉiam malpli vojaĝas al renkontiĝoj. La organizantoj estis EEU kaj la E-societo de Rijeka.



Tamen la kongreso havis esceptajn rezultojn kaj estis tre riĉa enhance. La kongreson aŭspiciis la ŝtatsprezidento de Kroatio Ivo Josipović kio grave levis ĝian prestiĝon kaj la informmedioj tre interesiĝis pri ĝi. Unu monaton antaŭ la kongreso akceptis la delegitaron de EEU la aŭspicianto en sia prezidantejo en Zagrebo. Aŭspiciis la kongreson ankaŭ la urbestro de Rijeka kaj estraro de la regiono Primorsko-Goranska kiu grave materie helpis. La urbo disponigis senpage grandan ĉefan kulturhejmon (Kroata Kulturdomo) kie la kongreso okazis kaj la regiono eĉ helpis per iom da mono por preparlaboroj. Tial en la urbo estis granda banderolo super la ĉefstrato kaj multloke afiŝoj kun kongresa kultura programo dismetitaj de la urbestro. La urbestro mem ankaŭ kunvokis konferencon por ĵurnalistoj al kiu venis 5 ĵurnalistoj de plej gravaj lokaj kaj naciaj medioj kaj poste al la malfermo eĉ pli da ili. Estis pluraj raportoj de televido, radioj, elektronikaj blogoj kaj pluraj tagĵurnaloj.



Kadre de la kongresa ĉeftemo okazis 5 prelegoj inter kiuj 3 estis de neesperantistaj universitataj profesoroj (Milorad Pupovac, profesoro kaj deputito en kroata parlamento, Emil Heršak kaj Jagoda Granić). Krom ili prelegis Nikola Rašić kaj Seán Ó Riain. La prelegaro donis la eblon akcepti priteman rezolucion kun proponoj al EU kiel igi la komunikadon en EU pli justa.



La asembleo de EEU dum sia formala kunsido akceptis la diversajn raportojn kaj elektis novan estraron por la sekva 3-jara periodo: La prezidanto restas Seán Ó Riain, ankaŭ la vicprezidantino Flory Witdoeck kaj la sekretario Zlatko Tišljar. La estraro nun havas tri pliajn membrojn: Nikola Rašić, Petro Balaž kaj Sandra Schweder. La malferma asemblea kunsido traktis strategion de EEU por la estonto kaj akceptis 5 strategiajn celojn: unue pluaktivi en Platformo por multlingvismo de la neregistaraj organizoj, klopodante plu klarigi la eblan rolon de Esperanto kiel katalizilo (plirapidigilo) por lerni naciajn fremdlingvojn, due pluagi disvastigante la proponon al eŭropaj korusoj kanti esperantan tekston de eŭropa himno kiam oni tion deziras, trie stimuli eŭropajn E-asociojn, grupojn kaj entreprenojn krei projektojn kadre de konkursoj de EU, kvare disvastigi solidaran kunlaboron inter pli riĉaj kaj



fortaj landaj asocioj kaj tiuj en krizo per aŭspiciado kaj kvine EEU klopodos realigi Euroscola en Strasburgo dulingve (kiel eksperimento) en kiu la oficialuloj uzos la anglan kaj la partoprenantaj gejunuloj el dudeko da landoj Esperanton.

Antaŭlastan tagon oni dediĉis al demando pri novigaj manieroj aktivi en lokaj grupoj ĉar ankaŭ la agado de E-societoj estas en grava krizo. Estis proponitaj interesaj novaj agadmanieroj aparte por etaj urboj, kaj aparte por grandaj.

Okazis krome multaj aliaj diversaj prelegoj inter kiuj elstaris la prelego de Bernhard Tuidier pri la internacia E-muzeo en Vieno.

La kulturajn programojn komencis kiel kutime folklora vespero kiun plenumis folklora grupo »Zora« el Opatija. La grupo konsistanta el trideko da dancantoj en popolkostumoj de diversaj regionoj en Kroatio kaj muzikistoj efektivigis 70-minutan programon. Landon okazis koncerto de kanzonoj de Georgo Handzlik (kiu kantis siajn originalajn kanzonojn inter kiuj kelkajn novajn) kaj Saša Pilipović kiu kantis popolajn kaj popularajn kanzonojn de parto de iama Jugoslavio (el Serbio, Bosnio-Hercegovino kaj Kroatio). Surprizis nin lia bela voĉo kaj kantkapablo pri kiu ni ĝis nun ne multon sciis. Mardon koncertis tenoro Neven Mrzlečki, membro de Operteatro en Zagrebo. Li kantis elektitajn ariojn de diversaj oper- kaj operetaŭtoroj parte kroataj parte diversnaciaj en klara Esperanto (malofte oni aŭdas operariojn en klara lingvo). Grandan plimulton el ili li mem esperantigis.

Postan tagon ni vidis teatraĵon. Aŭtoro de la teksto: Georgo Handzlik, ludis Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik. Titolo: Societo de viktimoj de Shirley Valentine. Temas pri interesa problemo de mezaĝaj paroj en kiu Saša ludas la edzon kaj Georgo ludas plurajn rolojn. Bedaŭrinde la teatraĵo ne estis finellaborita, la roluloj kelkfoje ne bone memoris la tekston kaj ĝi ne estis spontana .

Ĵaŭdon ni havis esceptan honoron aŭskulti altprofesian koncerton de juna perkutistino Kaja Farsky kiu sola ludas per dudeko da perkutinstrumentoj kies centro estas marimbo. Ŝi prezentis modernan perkutmuzikon de kelkaj aŭtoroj de la 21-a jarcento. Ŝia lerto kreis por ĉiuj neforgeseblan vesperon en kiu tremis la emocioj. Malmultaj vidis iam antaŭe similan koncerton.



La lasta koncerto estis same speciala kaj altprofesia. Temas pri ensemblo Druyd el Zagrebo en kiu la proprajn melodiojn kaj komponaĵojn prezentis tri plenumantoj kaj aŭtoroj: Dubravko Lapaine, gvidanto de la grupo kaj ludanto je diĝeriduo, Ivan Ŭravić, gitarludanto kaj Mary Crnković-Pilaš, solo-kantistino. Dubravko Lapaine estas virtuozo de tiu prainstrumento kiu nur per tre ellaboritaj diversaj manieroj kaj

teknikoj spiri sukcesas el ligna tubo sen iu ajn eblo influi la internon de la tubo eldevigi sennombro da sonoj kiuj reprezentas preskaŭ ĉiujn orkestrajn instrumentojn. Mary kun sia enorma sonvasto kapabla aparte senerare kanti altegajn tonojn ravis per kantado de nekutimaj melodioj kaj Ivan bonege akompanis per gitaro foje ankaŭ kunkantante. La koncerto iom pli ol unu-hora kreis la atmosferon de neteraj kondiĉoj, akompanis kaj gvidis nin de la praeksplo al la enormaj spacoj de la disvastiĝanta kosmo. Travivaĵo maloftega.

Paralele kun kelkaj programoj eblis spekti dum du tagoj elektitajn filmojn el arkivo de Krunoslav Tišljar. Temas pri tre interesaj dokumentoj pri la E-movado de 1980 ĝis 2010. Eblis vidi partojn de la festo de 100-jariĝo de Esperanto en Zagrebo kun koncerto de Joelle Rabu, teatraĵojn de BET kaj SEK, televidajn filmojn kreitajn dum la IJKoj en Zagreb (1988) kaj Rijeka (1998), pri infana denaska edukado, Renkontiĝo de E-familioj, kelkajn puĝtarajn

spektaklojn el la tempo de PIF ktp. Krome oni havis la eblon vidi filmon Laŭ la spuroj de Tibor Sekelj de serbaj aŭtoroj Stipan Milodanović kaj Fila.



La ekskursita tago donis la eblecon viziti la insulon Krk perŝipe aŭ aŭtobuse viziti historiajn urbojn de Istrio.

Aparte menciindas ke la Esperantistaj verduloj festis sian 30-jariĝon kaj ke Kroatia E-Ligo sukcesis ricevi subvencion por 10 gejunuloj kiuj havis la celon lerni pri la organizado de internaciaj kongresoj kaj ili efektive helpis en diversaj

teknikaj taskoj.

Dum la malfermo unue estis kantataj la kroata kaj la eŭropa himnoj, oni legis la mesaĝon de la ŝtatestro kaj la reprezentantoj de la urbo kaj la regiono salutis la kongreson, Seán kaj Nikola parolis pri la celoj de la kongreso kaj de la ĉeftemo, Jozefo Reinart transdonis premion Cigno por la jaro 2013 al Kroatia E-Ligo kaj fine oni povis spekti tre interesan provkodon kun eŭropa himno en Esperanto (kantata de koruso de Oostende) kaj kun komencoj de ĉiuj 28 landaj himnoj dum kiuj prezentiĝis fotoj pri la plej karakterizaj vidindaĵoj de la koncernaj landoj.



Kaj jen la konkludoj akceptitaj fine de la kongreso:

1. La kongreso substrekas la gravecon de lingva justeco, kiel ero de la ĝenerala justeco;
2. atentigas pri la neceso, ke EU evoluigu kulturen politikon;
3. bedaŭras la decidon de la itala EU-prezidanteco forigi la francan kaj germanan lingvojn de sia prezidanteca retejo. Tiu decido rekte kontraŭas la oficialan EU-politikon de multlingvismo kiun decidis la EU-ĉefoj de ŝtato kaj registaro en la Eŭropa Konsilio de Barcelona en 2002;

4. konsideras, ke la retejo de ĉiu EU-prezidanteco devus esti en ĉiuj 24 oficialaj EU-lingvoj, por alparoli ĉiujn civitanojn en la 28 EU-landoj egalrajte, kaj tiel alproksimigi la eŭropan integriĝon al la civitanojn;
5. konsideras, ke la kosto de tia retejo ne estas pravigo, ĉar temas nur pri salajroj de ĉirkaŭ 50 tradukistoj dum 6 monatoj, ĉiun 14-an jaron;
6. substrekas la gravecon de la kantado de la eŭropa himno far civitanojn el diversaj EU-landoj kune en neŭtrala lingvo por antaŭenigi eŭropan identecon harmonie kun naciaj kaj regionaj identecoj;
7. atentigas, ke la Civilsocia Platformo por Multlingvismo, starigita far la Eŭropa Komisiono en 2009, rekomendas praktikajn testojn en lernejoj por ekscii kiu dua lernota lingvo plej kuraĝigas la sekvan lingvolernadon, kaj apelacias al ĉiu EU-Membroŝtato starigi tiajn programojn en siaj lernejoj, laŭ la supremenciita oficiala EU-politiko, ke ĉiu lernu 3 lingvojn, la denaskan kaj 2 aliajn;
8. rekomendas al la Eŭropa Komisiono tradukigi la raporton de la Civilsocia Platformo por Multlingvismo de junio 2011 al ĉiuj 24 oficialaj EU-lingvoj;
9. rekomendas al ĉiuj EU-membroŝtatoj studi la slovakon modelon de Eŭropa Konvencio por plie engaĝi la civitanojn en la eŭropa integriĝo.
10. Post fakaj prelegoj pri la kongresa temo, la kongreso konstatis, ke
 - a) ekzistas tendenco en la tutmondiĝo, ke fortiĝu supera lingvo, metanta ĉiujn aliajn lingvojn en duarangon pozicion;
 - b) ekzistas minimume 2 vojoj por plibonigi tiun staton: 1) ke oni kreu artefaritajn regionajn lingvojn baze de lingva parenceco, ekzemple meza slava, latinida kaj ĝermana lingvoj; 2) ke oni uzu neŭtralan lingvon por tuta Eŭropo;
 - c) por komenci la procezon de plijustigo de lingvaj rilatoj, ĉiu civitano senescepte, devus rezigni pri la uzo de la propra lingvo por komunikado inter malsamlingvanoj.

Zlatko Tišljarić

PUBLIKA PREZENTO DE WIKITRANS AL KROATIA ĴURNALISTARO



dissendis la informon al ĉiuj kroataj medioj.

La 24-an de junio 2014 EEU kaj Kroatia E-Ligo organizis tre sukcesan konferencon por publikaj medioj en Zagrebo pri la fenomeno de tradukmaŝino WikiTrans. La gasto estis ĉefgvidanto de la projekto WikiTrans en Suddana universitato d-ro Eckhard Bick. Ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj plej gravaj kroataj medioj (kroata informagentejo HINA, kroata nacia televido, unu el la plej multekzempleraj taggazetoj "24 sata", radio Glas Hrvatske). HINA

En la konferenco ni informis ke nuntempe Esperanto havas la plej grandan kvanton da vikipediaj artikoloj ĉar la tradukmaŝino WikiTrans tradukis 4,35 milionojn da artikoloj el la angla kaj se oni aldonas pliajn 200.000 de la esperanta vikipedio la sumo estas iom pli granda ol la nombro de artikoloj en la angla.

Enkonduke Damir Mikuličić, kroata eldonisto, klarigis ke li pristudis plurajn tradukojn de la maŝino kaj analizis tri artikolojn hazarde elektitajn kies e-tradukon li retradukis kune kun la eraroj al la kroata. Li diris ke 99% de la E-a teksto estas tute korekta kaj nur 1% estas erara kaj ke la plimulton de tiuj eraroj normala leganto povas tuj korekti baze de la kunteksto. Do lia takso estas ke la rezulto de la laboro de WikiTrans estas adminirinda kaj plene kontentiga por konantoj de Esperanto. La nuna tekstaro de esperantaj artikoloj en Wikitrans www.wikitrans.net ampleksas pli ol 40 milionojn da paĝoj kio en papera formo estus libro dika pli ol 2 kilometrojn.

Oni povas nun aserti ke en Esperanto ekzistas enciklopediaj informoj pri ĉiuj fenomenoj en la mondo, kiujn konsideras grava la anglalingvaj parolantoj. Sekve ne plu eblas aserti ke en Esperanto ne ekzistas sufiĉa faka literaturo.

Post la ĵurnalista konferenco Kroata ĵurnalista agentejo publikigis detalan informon pri la temo kaj pere de ĝi publikigis granda kvanto da artikoloj en multaj retaj kaj paperaj gazetoj aldone al tiuj de ĵurnalistoj kiuj ĉeestis la konferencon. Speciale meenciinde estas ke okazis ankaŭ elsendo en ĉefa kroata nacia televido en bona posttagmeza termino je la 18:30 kaj eĉ artikoleto en plej legata kroata flavgazetara taggazeto. Jen unu el la rezultoj: <http://tehnoklik.net.hr/vijesti/najkvalitetniji-prevodilacki-stroj-na-svijetu>

Zlatko Tišljar

ANTAŬLASTA LABOR RENKONTIĜO DE LINGVO-INFO EN ZAGREBO



Inter la 24-a kaj 27-a de junio okazis en Zagrebo antaŭlasta laborrenkontiĝo de partnereaj organizoj en la projekto lingvo.info, kiun kunordigas kaj gvidas EEU. La kunsidoj okazis en hotelo Palace kie oni intense laboris klarigante la ankoraŭ ne plene klarajn elementojn de la projekto, iujn mistradukojn k.s. Oni eluzis la fakton ke en Zagrebo eblis lui nemultekoste tonstudion por surbendigi necesajn

materialojn ke la postaj uzantoj de la paĝaro lingvo.info povos aŭdi elparolatajn vortojn kaj frazojn en diversaj lingvoj. Oni tiel sukcesis surbendigi la tekstaron en dek lingvoj kiujn legis apartenantoj al la partneraj organizoj kaj konantoj de diversaj lingvoj. Al la partneroj estis donitaj ankaŭ informoj pri la financaj raportoj kaj lastaj taskoj farendaj.

Krome dum la kunsido ni prezentis novajn projektajn varbmateriojn kiujn ni planas ĉefe uzi de septembro kiam la projekta teamo planas pli seroze ekvarbi inter ĝenerala publiko. Ni produktis informilojn kaj afiŝojn en pluraj lingvoj kaj ni volonte disponigos al ĉiuj interesitoj esperantajn lingvo.info afiŝojn en formato A2. Se vi ŝatus uzi afiŝojn en via nacia lingvo, kontaktu la projektteamon por kontroli ĉu en via lingvo ili estas haveblaj.



La projekto nun troviĝas en la lasta ampleksa laborfazo – tradukado de materialoj al minimume 19 lingvoj kaj pri tiu ĉi tasko ankaŭ vi ĉiuj povas helpi la projekton. EEU daŭre serĉas volontulojn kaj helpantojn por tradukado de entute sufiĉe granda kvanto da tekstoj al ĉiuj europaj lingvoj, speciale gravaj lingvoj por kiuj ni urĝe bazonas plian helpon estas la germana kaj nederlanda. Ambaŭ lingvoj troviĝas en projektkontrakto kaj nepras havi la tradukojn ĝis la fino de la projekto. Tamen pluraj lingvoj ne estas listigitaj en la kontrakto, sed ni tre ĝojus se ni povus publikigi la paĝaron ankaŭ en tiuj aldonaj lingvoj, ekzemple la finna, itala, portugala, rumana. Sed helpo por preskaŭ ĉiuj lingvoj estos tre bonvena ĉar la tekstokvantoj estas grandaj kaj estas pli facile se pluraj personoj dividas la laboron.

Maja Tišljarić

ĴURNALISTA KONFERENCO EN RIJEKA PRI EEU-KONGRESO



La 1-an de julio 2014 la urbestro de la urbo Rijeka kunvokis en sia Informa centro konferencon por ĵurnalistoj okaze de la kongreso de eŭropaj esperantistoj kiu estis okazonta en tiu ĉi urbo.



Al la konferenco venis 5 ĵurnalistoj, tiuj de loka televido, radio, tagĵurnalo kaj aliaj. La informojn pri la kongreso prezentis Maja kaj Zlatko Tišljari kaj Boris Di Costanzo. Estis pluraj demandoj kaj tri televidaj kaj radiaj intervjuoj. La loka televido TV RI elsendis jam antaŭan tagon dufoje dekkvinminutan elsendon en kiu estis intervjuitaj membroj

de LKK. Post la konferenco aperis pluraj radio- kaj televidelsendoj kaj pluraj artikoloj en paperaj kaj elektronikaj ĵurnaloj interalie en tagĵurnalo Novi list kaj tagĵurnalo de Split Slobodna Dalmacija. Krome la urbestro mem disgluis la kulturan programon de la kongreso invitante Rijekanojn ĉeesti en multaj publikaj lokoj kaj same la tagĵurnalo Novi List aperigis tiun programon en aparta aldono al la gazeto. Trans la ĉefstrato Korzo estis pendigita 10-metra banderolo kun la titolo: 10-a kongreso de eŭropaj esperantistoj. Sume oni devas diri ke la informado de la neesperantista publiko estis tre ampleksa kaj ne nur ke ĉiuj Rijekanoj sciis pri la kongreso sed ankaŭ multaj eksterlandaj turistoj kiuj tiutempe feris en Rijeka.

Zlatko Tišljari

ĈIAM PLI KLARA LA INTENCO UNULINGVIGI EU-on

La 29-an de junio 2014 eblis legi en la paĝaro de la belga semajnjurnalo "Le Vif / L'Express" jenan tekston sub la titolo: "Multilingvismo ... nur en la angla":

<http://www.levif.be/info/actualite/international/multilinguisme-en-anglais-seulement/article-4000675384369.htm#reviews>

"Kiel vi scias, la Eŭropa Komisiono taksas kiel gravegan la multilingvan komunikadon" deklaris ridante, kaj en la angla, la eŭropa Komisionanino Androulla Vassiliou, pri Edukado, Kulturo, Multlingvismo kaj Junularo.

Ĉu oni kredu ŝin? Ŝia parolado, titolita "Linguistic diversity: the heart of Europe's DNA" ("Lingva diverseco: sine de la eŭropa DNA), kiun ŝi eldiris la 24-an de junio dum konferenco en Bruselo, legeblis nur en la angla en la paĝaro de la Eŭropa Komisiono. Tiu mispaŝo ne estas unika. La itala turna prezidanteco, kiu ekis la 1-an de julio, decidis limigi la retajn tradukojn al la angla kaj al la itala. "La germana kaj la franca eniras enfalujon" komentis la paĝaro Euractiv. Nu, ekde 2007, la turnaj prezidantecoj de EU ĉiam prizorgis multlingvajn TTT-ejojn, kun tradukoj en la germana, la franca, la angla kaj la nacia lingvo de la prezidanteco".

Endas konstati ke ankaŭ la TTT-ejo de s-ino Androulla Vassiliou, estas prezentata nur en kvar lingvoj: la angla, la franca, la germana kaj la greka:

http://ec.europa.eu/commission_2010-2014/vassiliou/index_fr.htm

Partoj estas ja legeblaj en 23 eŭropaj lingvoj, sed ne malofte pliaj informoj estas prezentitaj nur en tri, kvar lingvoj, kelkfoje nur en la angla! Belega ekzemplo de multlingvismo... Fakte kiu ajn povas konstati ke en eŭropaj medioj la lingvoj apartenas al feŭda sistemo kun

- imperiestra lingvo: la angla,
- nobelŭlaj lingvoj: la germana kaj la franca;
- kampulaĉaj lingvoj: ĉiuj aliaj...

Ni bedaŭru ke por niaj eŭropaj manitoj, la nova "Raso de la Sinjoroj" estus la "native English speakers" dum la aliaj estus nur malestimindaj subuloj!

Germain PIRLOT

KONTRIBUO DE AŬSTROJ AL LA TAGO DE ESPERANTO



La 24-an de julio, nome de Aŭstria Esperanto-Federacio AEF, mi deponis ĉe APA (Aŭstria Gazetara Agentejo) 38-linian gazetarkomunikaĵon pri la 26a de julio, naskiĝa datreveno de Esperanto kaj pri la kontribuo de AEF al ĝi. Temas pri la traduko de la aŭstria nacia himno al Esperanto, kiu estis necesa ĉar la aŭstra parlamento decidis pri modifoj de la ekzistinta himno cele al seksneŭtraligo. Senpera kaŭzo de la

traduklaboro de AEF estis peto de distrikta muzeo Viena, ĝuste tie kie vivis dro Franz Jonas prezidento de nia respubliko inter 1965 kaj 1974 kaj aktiva ano de la laborista Esperanto-movado. En 1970 li inaŭguris la Universala Kongreson de Esperanto en Vieno per libera parolado.

Je lia memoro pro lia 115-a datreveno de naskiĝo la distrikta muzeo Floridsdorf inaŭguros ekspozicion je la 1-a de oktobro ĉi-jara, kiun ĉeestos la aktuala prezidento de Aŭstrio, dro Heinz Fischer, kies patro ankaŭ estis Esperanto-aktivulo. Kadre de tiu ekspozicia malfermo la aŭstria nacia himno estos kantata de profesia kantistino EN ESPERANTO! AEF do laŭ peto de la muzeo prizorgis la tradukon kaj prikonsilos la kantistinon. La afero por la aŭstra publiko estas tial atentokapta, ĉar en Aŭstrio nuntempe okazas sufiĉe arda diskuto pro la modifoj de la himno far la aŭstria parlamento, aparte en la gazetaro. Bona ŝanco por videbligi Esperanton en Aŭstrio!

Hans Michael Maitzen

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de julio 2014

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Germain Pirlot, Hans Michael Maizten, Maja Tišljar kaj Zlatko Tišljar

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

